



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 6

JUNIO 2024 Kol. 468/40

XX

Enhavo: Mesaĝo de UEA, Novaĵoj de KAVA-PECH,
Grupo E-mental' en aŭstria Graz, Somera senŝeligado,
Multkultura semajno, Surpriza recepto, Solvo.

XX

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj, 15 majo 2024

Ĉar homoj unuiĝas en familioj, je pluraj formoj, esencas, ke ni pripensu la problemojn kaj bezonojn de familioj por vere konstrui mondon de rajtoj kaj evoluigo por ĉiuj. Ekde rajtoj de infanoj, virinoj kaj pliaĝuloj, ĝis laboraj kondiĉoj kaj protekto de naturmedioj, familioj ludas gravan rolon kiel antaŭenigantoj de pozitivaj ŝanĝoj. Ĉar familioj konsistigas la fundamenton de socio kaj provizas ekonomie kaj emocie la venontan generacion, famili-celaj politikoj necesas, precipe por la plej vundeblaj. Politikoj devas rekoni familian strukturon kaj aliajn trajtojn, kaj subteni kaj plibonigi la materialan, interrilatan kaj subjektivan bonfarton de familioj. En 2024 ni festas la tridekan datrevenon de la Internacia Jaro de Familioj. Tio estas okazo por konsciiĝi pri efikoj de ŝanĝoj en teknologio, demografio, urbigo, migrado kaj klimato, kiuj temas pri familioj. Rilate al migrado, ekzemple, en 2018, 1,9 milionoj homoj migris pro familiaj kialoj aŭ kun siaj familianoj.

La 78-a Ĝenerala Asembleo de UN, en rezolucio, alvokas registarojn estigi novajn strategiojn kaj programojn rilate al familiaj bezonoj. Ni kredas, ke tiuj devas inkluzivi ankaŭ lingvan politikon. Familioj estas samtempe konservantoj de lingvoj kaj posedantoj de lingvaj homaj rajtoj. Ĉiuj familioj rajtas uzi kaj disvastigi ĉu gepatrajn ĉu elektitajn lingvojn. Individue, infanoj rajtas lerni en lingvoj kiujn ili uzas denaske, ĉiuj rajtas aliri publikajn servojn per lingvoj kiujn ili bone komprenas, kaj pli grave, ĉiuj homoj rajtas partopreni en la ĝenerala publika debato. Fakte, lingvaj baroj ankaŭ malebligas atingi la Celojn por Daŭripova Evoluigo. Ni bezonas aŭskulti la voĉojn de ĉiuj familioj en ĉiuj lingvoj por garantii aliron al justeco kaj informado, antaŭenigi inkluzivecon kaj partoprenon, kaj lasi neniun malantaŭe. Universala Esperanto-Asocio, per sia uzo de la Internacia Lingvo Esperanto, celas samtempe garantii tutmondajn lingvajn rajtojn kaj formi lingvan ponton inter lingvoj, popoloj kaj familioj ĉie en la mondo.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA


Novaĵoj de KAVA-PECH

Malgraŭ tio, ke mi jam volis fini la Esperanto-fakon de mia eldonejo KAVA-PECH fine de ĉi tiu marto kaj transdoni ĝin al la eldonejo *Les éditions KAVA-PECH* de François Bolduc kun la sidejo en Montrealo, mi plu aktivas ankaŭ en ĝi. La kialo estas, ke François petis min daŭrigi, ĉar li ankoraŭ ne havas kondiĉojn por ĝia transpreno. Tamen mi jam celas pli fokusiĝi nur al la literaturo en la ĉeĥa, kompreneble inkluzive de tradukoj el Esperanto.

La unua ĉi-jara eldonaĵo de KAVA-PECH estas la plej baza verko de Nikolao Koperniko *Pri la revoluoj de la ĉielaj korpoj / De revolutionibus orbium coelestium*. Kiel montras la titolo, ĝi estas dulingva: la propra teksto verkita de Koperniko en la latina originalo kun traduko en Esperanton, kun abundaj klarigoj kaj notoj, kiuj estas nur en Esperanto. La tradukintoj kaj aŭtoroj de la aldonaj tekstoj estas profesoroj Hans Michael Maitzen el Vieno kaj Reinhard Fössmeier el Munkeno. Tio estas jam la tria rezulto de ilia kunlaboro, post *La gregoria kalendar reformo* kaj ĝiaj postefikoj kaj *Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado / Reise eines deutschen Professors ins Eldorado*. Ĉiuj

ĉi aperis ĉe KAVA-PECH.

Plia libro, kiun mi volas prezenti, estas en la ĉeĥa, sed firme ligita al Esperanto. Temas pri la ĉeĥa traduko de la finalistaj noveloj de la dua interkultura Novelo-Konkurso (ankaŭ eldonita ĉe KAVA-PECH) *Poslední Cézarova cesta a jiná noční dobrodružství*. Ĝi enhavas 37 finalistajn rakontojn el 421 venintaj (bedaŭrine neniu el Ĉeĥio). La eldonon ebligis la tradukintoj Monika Kimáková (ĝis la paĝo 48 kaj Jindřich Košťálek (paĝoj 49 ĝis 172).



Certe temas pri konvena donaco al niaj neesperantistaj amikoj. Baldaŭ aperos *Golemo* kaj aliaj judaj mitoj de la malnova Prago, majstroverko de Eduard Petiška okaze de lia centjara

jubileo. La verkon tradukis Vladimír Türk kaj ĝi aperos kun koloraj ilustraĵoj de Miroslava Tomečková.

En la jam antaŭpresa fazo estas ankaŭ *Esperanta-Ĉeĥa kaj Ĉeĥa-Esperanta Poŝvortaro* de Miroslav Malovec. Ĝi celas komencantajn esperantistojn, por kiuj ne nenecesas aĉeti grandajn kaj do multekostajn unuflankajn vortarojn.

Detalajn informojn, ankaŭ rilate al pli frue eldonitaj libroj de KAVA-PECH vi trovos ĉe <https://kava-pech.cz>.

Petr Chrdle, chrdle@kava-pech.cz

Grupo E-mental´ en aŭstria Graz

Dek membroj de la klubo E-mental´ forveturis la 15-an de marto 2024 per trajno el Prago al Graz en Aŭstrio, lando Stirio, por travivi semajnfino kun lokaj esperantistoj. La evento estis planita jam kelke da monatoj kaj grazanoj dume diligente preparadis programon. Ĉar E-mentalanoj estis informitaj pri la planoj, ĉiuj tre ĝojatendis la kunvenon. Sed ĉiuj imagoj pri la renkontiĝo estis superitaj. La programo estis perfekte preparita de la komenco ĝis la fino kaj la partoprenantoj vere povis ĝui ĉiujn programerojn. Jam alveno al la ĉefstacidomo en Graz estis eminenta. Post komuna fotado sur la perono estis la E-mentalanoj portitaj per aŭtomobiloj al Esperanto-monumento kaj post plua fotado plue al la loĝloko.

Post la loĝiĝo ĉiuj kunvenis en saloneto de nemalproksima restoracio por vespermanĝi kaj interkonatiĝi. Sabate matene la E-mentalanoj estis aŭte portitaj al la klubejo, kiun grazanoj antaŭnelonge akiris dank´ al la urbestro. Post la trarigardo de la vere tre bela klubejo ĉiuj kune promenis ĝis la urbocentro, kie en surtegmenta kafejo estis mendita tablo. Post trarigardo de la urbo el la tegmento ĉiuj kafumis aŭ teumis, lokuloj parolis kun

ĵurnalistoj. De la kafejo ni iris al Kastela monto super la urbo, kie ni vidis Horloĝan turon, kastelon, vizitis muzeon, ĝuis rigardon al la urbo kaj dum la tuta tempo ricevadis multe da interesaj informoj de la lokuloj...

Post reveno el la monto oni vizitis urban turisman informojon, kie oni povas dank' al lokaj esperantistoj trovi broŝuron pri la urbo ankaŭ en Esperanto.

Dimanĉe matene estis E-mentalanoj portitaj per aŭtomobiloj al la proksima vilaĝo Thal, kie oni unue vizitis interese rekonstruitan preĝejon kaj poste domon, kie naskiĝis Arnold Schwarzenegger kaj kie nuntempe estas muzeo pri li. De la muzeo ni jam rapidis al restoracio por tagmanĝo, ĉar la trajno de E-mentalanoj reen al Ĉeĥio veturis duonhoron post la tagmezo.

La tuta semajnfino estis vere bonega. La grazanoj sukcesis perfekte ĉion plani, ĉiam ili estis helpemaj, komune ili diskutis kaj pri seriozaj kaj pri malseriozaj temoj. Nekredebla estis ilia sukceso ricevi subvencion de la urba registaro kaj dank' al tio E-mentalanoj havis ekzemple senpagan tagmanĝon kaj vespermanĝon.

A	M						
B		K					
C	M						
D		K					
E	M						
F		K					
G	M						
H		K					
I	M						
J		K					

Vlasta Pištíková

Somera senŝeligado

De pli ol 40 jaroj estas en Belgio eldonata Esperanta monata gazeto kun titolo, kies lasta vorto estas kaŝita en la sekretoj en la meza nuanca kolono de la horizontala komplemento.

Vi trovas en ĝi artikolojn pri politiko, ekonomio kaj kulturo. Al ĝi kontribuas preskaŭ 160 da korespondantoj kaj kunlaborantoj el 47 da landoj. Ĝiaj abonantoj estas legantoj el 64 da landoj.

A. Ĉeflaboristo en fabriko. – **B.** Supo kromplado. – **C.** Malo de la nova. – **D.** Labori kun nadlo kaj fadeno. – **E.** Frontaĵoj de kapo sen haro ĉe bestoj. – **F.** Metallo kun signo Cu. – **G.** Optika okazo el la ĉielo. – **H.** Esti kantisto. – **I.** Peceto de manĝaĵo. – **J.** Evidenta.

Multkultura semajno

De 17.5 ĝis 24.5.2024 okazis en urbo Pardubice festivalo



„Multkultura semajno“, kiu al la publiko prezentis kulturojn de diversaj nacioj vivantaj komune en la urbo. Lokaj esperantistoj de EK de dr-

o Schulhof uzis inviton de organizantoj partopreni ĉe la aranĝo. Por lundo 20.5. en Biblioteka centro „U Vokolků“ estis preparita duhora programo „Renkontiĝo kun Esperanto“. Komence salutis la partoprenantojn la prezidantino de la festivalo

sinjorino Baklíková kaj poste estis prezentita al la publiko agado de esperantistoj; de unuaj historiaj paŝoj ĝis nun. Por imago, kiel Esperanto sonas estis kantita unu fama ĉeĥa kanto en la Lingvo kaj estis deklamitaj poemoj de la poeto Čestmír Vidman, unue en Esperanto, poste en la Ĉeĥa.

La esperantistoj prezentis la Lingvon el ĉiuj flankoj kiel utilan lingvon, parolis ankaŭ pri ĝia vojo perfektigo kaj pri spertoj de ĝia uzado internacie. Interesiĝantoj multe demandis kaj el respondoj eksciis, kiel riĉa povas esti vivo kun Esperanto. En najbara saloneto estis ekspozicio de esperantistaj libroj, gazetoj, revuoj kaj aliaj esperantaĵoj. La aranĝon vizitis ankaŭ la loka televido V1 kaj preparis mallongan informon por siaj spektantoj. Ne mankis informoj en la regiona radio kaj en interretaj rimedoj.

L. Hakl

Solvo: de estinta membro de klubo el 80. da jaroj – M.K.

A	M	A	J	S	T	R	O
B		K	N	E	L	O	
C	M	A	L	N	O	V	A
D		K	U	D	R	I	
E	M	U	Z	E	L	O	J
F		K	U	P	R	O	
G	M	E	T	E	O	R	O
H		K	A	N	T	I	
I	M	O	R	D	A	Ĵ	O
J		K	L	A	R	A	

Surpriza recepto

Povas okazi, ke post resaniĝo de malvarmumo tenas vin plu tusado. Nenio helpas, nek tablojdoj, nek siropoj, nek kompreso, nek preĝo, nek io ajn.

Vere mi vin surprizos! Helpos al vi biero! Ĝi enhavas unikan

ingrediencon kaj vi povas la medikamenton mem fabriki. Vidu kiel: Vi bezonas 0,5 litron da biero kaj 150 gramoj da sukero. Unue degeligu sukeron sur milda varmigilo (fajro) kaj atentulo! ne ŝanĝu ĝin al karamelo. Demetu la poton de la fajro kaj verŝu bieron. Revenu poton al fajro kaj miksu dum 15 – 20 minutoj, ĝis la enhavo aspektas kiel mielo. Estas farite. Maturaj homoj uzos siropon unu kuleron tage. Siropon povas uzi ankaŭ infanoj, unu kulereton tage. La efiko surprizos vin. Popola kuracado de J. Drahotová

El la redakcio.

Trista anonco:



Ni ricevis la malgajan sciigon, ke mortis la 28-an de majo 2024 nia E-amiko Norbert Karbe el Pirna, Germanio, multjara ano de AEH. Li estis grava samideano en la saksa E-movado. Li ĝisvivis 71j. Honoron al lia memoro.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,

530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ352010000002801322017 **SWIFT/BIC:** FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.